# b Raporto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI por 2018

*Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: Mar 31, 2019.*

**Nomo kaj mallongigo en Esperanto:**

Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI

**Nomo kaj mallongigo nacilingve:**

_______________________________________________ X sama kiel pasintjare

**Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:**

_________ /_________ X sama kiel pasintjare

**Jura statuso:**

_____________________________________________ X sama kiel pasintjare

*Se la sekcio havas juran registriĝon, bv. doni la lokon, instancon kaj daton de tiu registriĝo.*

**Rilato kun Landa Asocio de UEA:**

_____________________________________________ X sama kiel pasintjare

*Ekz.: ĉu integra parto, en kunlaboraj rilatoj aŭ plene sendependa de ĝi?*

**Membro-nombro fine de 2018:**

Sume: 70_58+8_. Detale: paperaj _58_ retaj _8 _ aliaj (1 HM)_1 DM + 3 familiaj membroj.

*Bv. informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.*

3 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrokotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 70 membrojn.

**Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2018:**

_____4_____. *Per aparta deklarilo vi nomumu ilin!*

*(kalkulu laŭ membronombro fine de 2012: 5-14: **1**; 15-34: **2**, 35-49: **3**, pli ol 50: **4**.)*

**Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:**

Oficiala hejmpaĝo: http://esperanto.de/agei Oficiala ret-adreso: zsofia.korody@esperanto.de

*Ĉe la retadreso bv. diri al kiu funkciulo ĝi indikas. Se vi havas retejon, kiu prizorgas ĝin:* Zsófia Kóródy
*kiomofte vi ĝisdatigas ĝin:* laŭ bezono, se estas gravaj novaĵoj aŭ gravaj ŝanĝoj
*kiujn planojn vi havas ampleksigi ĝin?* Ni foje-foje aldonas lernmaterialojn kaj instru-rilatajn broŝurojn
*Se ne, ĉu vi planas lanĉi retejon? Ĉu vi farus tion, se vi havus teknikan helpon de aŭ pere de ILEI?*

Ĉu via sekcio havas retgrupon:_______jes________________________
*Se jes, ĉu vi pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝojn al viaj membroj?* ne
*Se ne, kiel vi plusendas al viaj membroj mesaĝojn de ILEI?* prezidanto de AGEI, Zsófia Kóródy plusendas mesaĝojn al la listo. Ni plusendas ĉion, kio rilatas al aŭ estas grava por enlanda instruagado

**Revuo sekcia:** ______________________________ **X sama kiel pasintjare**

*Se via sekcio eldonas fizike presatan aŭ retan bultenon, bv. doni ĝian nomon, redaktoron, retadreson, oftecon kaj amplekson.*

**Enlanda membrokotizo:**

25 EUR, pro la altigita ILEI-kotizo el tiu sumo ekde 2012 restas 5 EUR/membro por landa agado

*Se la enlanda kotizo estas pli ol la internacia, bv. indiki kiun parton vi retenas por landa agado.*

**Nuna estraro de la sekcio:**

Zsófia Kóródy (prezidanto), Dr. Rudolf Fischer (vicprezidanto), Christof Krick (kasisto), Martin Ptasinski (estrarano). La aktualaj adresoj estas haveblaj de la prezidanto.

*Laŭeble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn.*

**Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:**

Elektoj okazis en majo 2018 en Zweibrücken, dum la jarĉefkunsido. La ĝistiama estraranoj estis reelektitaj. Sekva elekto: Pentekosto 2020
La mandato de la komitatanoj daŭris ĝis marto 2018, pri novaj mandatoj okazis decido en la jarĉefkunveno en majo 2018: komitatanoj estas la estraranoj.

---

=== ***Agado*** ===

*6 ĝis 10 linioj da klarigoj bonvenas; ligoj al pli longaj raportoj bonvenas.*
AGEI estas komunutila asocio, agadas por interkompreniĝo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitatan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia interŝanĝo de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankaŭ laŭ internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizaĵoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.

AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.
Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo al gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

**Propraj aranĝoj dum 2018:**

Kelkaj instrurilataj eventoj okazis en 2018.

**1. TORPEDo 13** (septembro 28 - oktobro 03, 2017) la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (samtempe 79a studsesio) okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo,
organizita de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj AGEI, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

Ĝia ĉefcelo estas oferti fakan spertiĝon kaj spertinterŝanĝon pri lingvoinstruado kaj specife pri Esperanto-instruado, ebligi traktadon de ĝenerale uzataj kaj uzeblaj instrumetodoj, informado pri en- kaj eksterlandaj fakaj eventoj, interesaĵoj, sciindaĵoj el la Esperanto-movado.

La .plurtaga seminario traktis la sekvajn ĉeftemojn: raportoj pri instrusperto kaj instrurilataj movadaj eventoj; prelegoj pri gramatiko kaj metodiko, literatura analizo, biblioteka esplorado, movada organizado kaj informado.
Krom la invititaj prelegantoj (Anina Stecay, Martin Ptasinski) ĉeestis kaj kontribuis ankaŭ Elisabet Sekelj, vidvino de Tibor Sekelj. Ŝi ne nur rakontis pri li sed prezentis kelkajn liajn verkojn

Zsófia Kóródy traktis tradiciajn kaj modernajn instrumetodojn, prezentis lernolibrojn kaj lingvajn ludojn, Peter Zilvar gvidis laborrondon pri informado, varbado kaj Esperanto-kulturo.

**Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:**
1. Dum la **95a Germana Esperanto-Kongreso** en Zweibrücken (18-21.05.2018) AGEI havis sian jarĉefkunvenon. Ĝi estis publika kaj allogis plurajn interesiĝantojn ne nur germanajn, ja la kongreso estis trilanda evento, kongreso ankaŭ de la franca kaj luksemburga Esperanto-Asocioj. Krom la asocia jarraporto kaj prezentado de planoj, en la kunveno temis ankaŭ pri trarigardo de la Esperanto-agadoj kaj rezultoj en la lastaj dek jaroj de la Germana Esperanto-Centro (GEC) en Herzberg kaj ĝia kunlaboro kun AGEI; pri la prilaborata modula klerigsistemo por instruistoj kaj lernejanoj kaj pri internaciaj edukaj projektoj.
Reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy starigis dum GEK informbudon ankaŭ kun lernmaterialoj, prelegis pri instruado de Esperanto per modernaj metodoj kaj pri klerigofertoj de la Esperanto-Centro en Herzberg.

2. La trian fojon estis organizita somera intensa Esperanto-kursaro **(Semajnoj de Esperanto-Perfektigo - SEP) en la Esperanto-Centro Herzberg**. La evento estis dusemajna kaj internacia, kelkaj kursanoj restis dum la tuta periodo, aliaj elektis unusemajnan blokon. Post la antaŭtagmezaj instruhoroj la kursanoj manĝis kune kaj organizis posttagmezajn vizitojn al belaj, interesaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, vizitis muzeojn, banejojn, ekskursis en la arbaro, testadis promenvojojn en la Harz-montaro.
La programon riĉigis kulturaj kaj muzikaj eventoj, komuna kuirado, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. La partoprenintoj havis la eblon renkontiĝi, paroladi kun lokaj klubanoj, vizitantoj kaj aliaj Esperanto-parolantaj gastoj. Je la fino de la semajno ĉiuj ricevis atestilon pri partopreno. La tuttaga lingvouzo bone helpis ĉiujn perfektigi siajn lingvajn kapablojn kaj la tre amika, agrabla etoso certigis bonfarton.

3. Kiel jam tradicie, ankaŭ en 2018 **kunvenis la reprezentantoj de landaj ligoj kaj fakaj asocioj de Germana Esperanto-Asocio (GEA)** en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo. La laborkunsidon gvidis Ulrich Brandenburg, prezidanto de GEA kaj partoprenis ĝin komisiito de GEJ, dudeko de delegitoj kaj gastoj. La semajnfina programo inter 26-28 oktobro enhavis raportojn pri la Germanaj Esperanto-Kongresoj, pri la agado de GEJ kaj de la landaj kaj fakaj asocioj kaj diskutojn pri estontaj planoj, eventoj, strategio. Al la programo aldoniĝis mallonga raporto de Zsófia Kóródy pri la agado de AGEI.

**Propraj projektoj dum 2018:**

AGEI kaj Interkultura Centro Herzberg (sub gvido de Peter Zilvar) iniciatis kunlaboron kun la t.n. Landa Plenkreskula Kleriginstitucio (Ländliche Erwachsenenbildung, LEB https://www.leb-niedersachsen.de/). Jam la kvaran jaron daŭras tutjara kurs- kaj klerigprogramo kun variaj temoj, prelegoj, prezentadoj, organizado de t.n. Interkulturaj Vesperoj. La agnosko estas grava atingaĵo, kiu ebligas montri la kulturperantan, edukan rolon de la internacia lingvo Esperanto.

**Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:**
AGEI subtenas la projekton „1 leciono pri Esperanto" de Klaus Friese, kies celo estas informi lernejanojn pri Esperanto ekz. en leciono, kiun gvidas anstataŭanta instruisto. La materialo estas jam havebla en pluraj lingvoj kaj atingebla sur la retpaĝaro de AGEI en menupunkto Biblioteko aŭ rekte per http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=83839799

AGEI kunlaboris kun la Esperanto-Centro en Herzberg en la dujara eŭropa projekto ERASMUS+, kies partneroj estis el Pollando kaj Slovakio. La celo estis klerigi novajn aktivulojn por la Esperanto-movado, kiuj ricevis krom la lingva kapabligo ankaŭ movadan trejnadon. Dum la lasta kunveno en Slovakio en somero 2018 dum Somera Esperanto-Studado (SES) ili trapasis KER-ekzamenon, pruvis siajn lingvajn kapablojn kaj per reciprokaj vizitoj al la projekt-landoj ili ekkonis ties aktivulojn, klubojn, movadajn strukturojn kaj povos en la estonto pli facile orientiĝi en internaciaj medioj. Inter la celaro de la projekto estis certigi por ili spertiĝeblon, peri konojn pri sciindaĵoj en la Esperanto-movado.

**Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:**

La programkajeroj de Popolaltlernejoj (VHS) atingas plurajn dekmilojn da legantoj, familiojn, vastan publikon. Estas ĝojige, ke pli kaj pli ofte lokaj kluboj, instruantoj utiligas tiun bonan tutlandan varbeblon per anoncoj pri Esperanto-kursoj. Kelkfoje poste ne realiĝas kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, tamen la publiko estas informita pri Esperanto kaj ekscias pri uzebloj de la lingvo.

AGEI-novaĵoj en Esperanto kaj en la germana lingvo aperadas en la gazeto de GEA Esperanto aktuell, dissendiĝas tra naciaj kaj internaciaj dissendolistoj, per retpaĝoj, Facebook kaj alvokoj por membriĝo kaj ekz. dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj aranĝataj en Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg.

ILEI preparis nacilingvajn varbilojn, ekz. por la reprezentiĝo en kunsidoj de UNESCO. La germanlingva traduko estas pretigita, estas je dispono por interesiĝantoj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652. AGEI pripensas ĝian paperan eldonon.

**Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:**

AGEI regule kunlaboras pere de pluraj siaj instruistoj kun popolaltlernejoj (Volkshochschule-VHS). En kelkaj urboj ankaŭ en 2018 aperis anoncoj pri Esperanto-lingvokursoj.

AGEI subtenas gekolegojn per kolektado kaj modelcela aperigo de varbtekstoj por tiuj kajeroj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

**Konata E-instruado en via teritorio:**

Bedaŭrinde malmultaj informoj alvenadas pri lerneja instruado. AGEI ne mem listigas la kursojn, sed alvokas ĉiujn gekolegojn de bazaj kaj mezgradaj lernejoj, plenkreskulaj kursoj kaj studrondoj en universitatoj registri siajn kursojn kaj detalojn pri la instruado ĉe http://edukado.net.

Kursoj kaj klerigcelaj kunvenoj okazas regule en pluraj federaciaj landoj, ĉefe aktivas gekolegoj ekzemple en Hamburg, Frankfurt, Stuttgart, Münster, Berlin, Hameln,, Neubrandenburg.

**Aliaj atingoj en 2018**

AGEI daŭre kunagas kun Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) por la ordigado, pliriĉigo de la Biblioteko en Herzberg am Harz, kie okazas tutjara programo, multaj kunvenoj, kursoj kaj klerigseminarioj, do la biblioteko servas publikan intereson. Ofte estas serĉataj literaturaj verkoj, lernolibroj, vortaroj, instruhelpiloj kaj metodikaj libroj.
**La pedagogia, metodika fakkolektaĵo** estas specialaĵo de tiu biblioteko. Ĝi estas je dispono por partoprenantoj de la klerigseminarioj, metodikaj kursoj kaj verkantoj de laboraĵoj.